


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ joulukuu ♦ decembro ♦ 5/2012



Bonan Julon kaj Feliĉan Novan Jaron 2013
Hyvää Joulua ja Onnellista Vuotta 2013



Millaista kielipolitiikkaa Suomessa voisi olla? p. 4–6

♦ La 79-a Esperantokongreso en Italio, p. 8 ♦ Vintraj Tagoj –
Talvipäivät 16.–17.3.2013, p. 12 ♦ Fabelkonkurso 2012, p. 15

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanpaja.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 24 e/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.

☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330

Kannen kuva: Raita Pyhälä (Saliko) / ”Bonan Kristnaskon / Hyvää Joulua”

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 050 5180 590, (02) 822 7779 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 09 813 3024, tiina.kosunen945@gmail.com
Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com
Jukka Nikoskelainen, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 ✉ juknik@utu.fi
Keith (Keke) Uber, Poutapolku 3 B 30, 02110 Espoo. ☎ 040 413 4252 ✉ keith_uber@yahoo.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi
Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de
Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Danske Bank 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.

☎ 044 2642 742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

Kristnaska prediko

En verka momento oni festas la sendependiĝon de la respubliko Finnlando, la 95-an datrevenon. Persono en tipa esperantista aĝo – kiel la skribanto de ĉi tiuj linioj tuj antaŭ Kristnasko – ekkalkulas, ke kiam ŝi/li naskiĝis, pasis nur 35 jaroj de la ŝtata sendependiĝo. – Kaj sep jaroj de la lasta militfino, dek ses de ties komenco. Nur! La vivo konsistas el relativaj nombroj, kiujn baza matematiko helpas nin bildigi.



La plej atentinda relativeco de la patruja historio estas la rilato inter la 95 jaroj de suverena ŝtato kaj la 67 jaroj post la militfino. Ni povas elkalkuli, ke jam du trionojn de sia historio la ŝtato vivis en konstanta paco. La finna vojo ludi rolon en la internacia vivo estas kompreni, sed ne partopreni internaciajn malakordojn; kompreni konfliktojn, sed ne esti partio en tiuj; esti ne juĝisto, sed jes kuracisto.

Dum la jaro oni multe parolis pri la kandidateco de Finnlando por membreco kiel alterna membro en la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj. Ne unuafoje – Finnlando jam estis alterna membro en 1989–90. Nun la kandidatiĝo kaj kampanjo ne portis sukceson, sed la lokon rezervitan por Eŭropo ricevis la eta Luksemburgio. Oni vaste esprimis seniluziiĝon, la oficiala Finnlando kaj ankaŭ multaj homoj sentis, ke la mankanta subteno en la ĝenerala asembleo estis malvenko.

Oni povas vidi la aferon ankaŭ alie. La Sekureca Konsilio sendube estas la plej aŭtoritata organo por internacia sekureco. Sed: Finan vorton havas la kvin konstantaj membroj, kaj malfacile estas ne esti katenita de la grandpotencaj aspiroj. Kuracista rolo povas esti kontraŭdira kun laika rolo en juĝistaro. Eble estis bone ne esti elektita. Eble estas bone ankaŭ realisme sperti,

ke bona famo kaj pozitiva rolo en la mondo ne estas konstanta memevidenteco, eĉ ne al Finnlando. Kuracisto konservu kaj progresigu sian kompetentecon.

Dolorige aktuala bezono de kuraco estas en landoj ĉirkaŭ Mediteraneo, kie la procezo komence nomita ”araba printempo” daŭris jam du jarojn kaj fino ne estas videbla. Ĝi komenciĝis kiel ribelo kontraŭ mizero kaj malegaleco sub maldemokratiaj reĝimoj. Rezultiĝis ŝanĝoj de registaroj kaj novaj favoraj perspektivoj en iuj landoj, en aliaj – longaj konfliktoj disvolviĝintaj ĝis civilaj militoj. Plej serioza, senespera, estas la situacio en Sirio. Oni ne scias, kiom da mortoj kostis tiu konflikto, kies radikoj ne estas en religio, ne en nacieco kaj ankaŭ ne en lingvo, sed en privilegioj, kiujn iuj havas kaj rifuzas fordoni aŭ dividi. La akriĝanta situacio en Egipto prezentas similan bildon; religia fundamentismo kovras, kamuflas la emon cementi ekzistantajn privilegiojn en tiu granda lando.

Legante ĉi tion ni jam proksimas al la plej alta pacfesto de la kristanoj, Kristnasko, Julio. Ni kaptu la okazon preĝi al la dio de ĉiuj religioj realigi ĝin.

Tuomo Grundström

Onko Suomessa kielipolitiikkaa?

Osa 3: Millaista kielipolitiikkaa Suomessa voisi olla?

*Tämän artikkelin pohjaksi luin Kotimais-
ten kielten tutkimuskeskuksen (Kotus) vuonna
2009 julkaiseman kielipoliittisen toimintaoh-
jelman. En tässä niinkään yritä referoida tuon
yli 200-sivuisen julkaisun sisältöä – se on kyllä
jokaisen luettavissa netistä [*] ja kiinnostuneil-
le suosittelenkin sen lukemista – vaan enem-
mänkin etsiä omaa näkökulmaani siihen, mi-
hin tuontapaista toimintaohjelmaa tarvitaan, ja
mitä seuraa, jos ei sellaista noudateta.*

Kohti globaalia englantia?

Kielipoliittisen toimintaohjelman tarve on syn-
tynyt siitä kansainvälisestä tilanteesta, että eng-
lanti on maailmassa entistä yleisemmin osattu
ja käytetty kieli, ja kun tavarat ja ihmiset ny-
kyään liikkuvat entistä enemmän yhteisillä glo-
baaleilla markkinoilla, tarve yhteisen kielen
käyttöön levittää englantia entistä laajemmal-
le yhä useammilla elämäntilanteilla. Englannin
kieleen törmäämme väistämättä. Katukuvassa
näkyvä englanniksi nimettyjä yrityksiä ja eng-
lanninkielistä palvelua tarjoavien liikkeitten
ilmoituksia, tietokoneruuduilla ohjelmien toi-
minnot ovat painikkeissa usein vain englannin-
kielisinä, teknisissä laitteissa on usein nappien
ja säätimien toiminnot englanniksi.

Kieliin voi tietysti suhtautua niinkin, että
ei tehdä mitään tietoisia yhteisiä linjauksia, ei
säädellä mitään, vaan annetaan vain eri kielten
käytön muodostua vapaitten yksilöllisten pää-
tösten mukaan. Silloin on kuitenkin hyväksyt-
tävä se mahdollisuus, että globaalit markkinat
syrjäyttävät pieniä kieliä pois käytöstä, jos kie-
len puhujat yksi toisensa jälkeen toteavat, että
jokin toinen kieli antaa enemmän. Esimerkke-
jä tästä on maailmalla monissa paikoissa, lä-
hellä ja kaukana. Irlantilaisten iiri ja Espanjan
ja Ranskan rajoilla puhuttava baski ovat olleet
aivan viime aikoina vähällä kadota, omassa
maassamme ja sen rajojen tuntumassa saame ja
karjala.

Kielen katoamisen prosessi voi olla salaka-
valan nopea. Sen alkuvaiheessa vieraan kie-
len leviämisestä ei juurikaan huolestuta, vaan
ajatellaan, että kyllä oma kieli kuitenkin on se
mistä ei luovuta, sehän on kansallisen identi-
teetin muodostajakin ja edelleen oman alueen
pääkieli. Toisen suuremman kielen osaamis-
ta pidetään vain lisäarvona, joka ei ole omalta
kieleltä mitenkään pois. Mutta kun sitten syn-
tyy sukupolvi, jolla yhteisön vanha oma kieli
ja suuremmalta kieliyhteisöltä omaksuttu kieli
ovat tasavahvoja, ollaankin jo lähellä peruutta-
matonta muutosta. Sitä seuraava sukupolvi ei
ehkä edes opi yhteisön vanhaa kieltä, eikä sen
jälkeen ole jäljellä enää mitään yhteisöä, joka
säilyttäisi vanhan kielen aitona ja elävänä. Ve-
näjäillä on esimerkkejä kansoista, joilla kan-
sallinen identiteetti perustuu edelleen vanhaan
omaa kieltä käyttäneeseen yhteisöön, mutta
joitten jäsenet enimmäkseen puhuvat vain ve-
näjää, ja irlantilaisten suhde iiriin ja englannin
kieliin on samantapainen.

Suomessa ollaan jo lähellä tilannetta, jos-
sa suurella osalla kansaa englantia alkaa olla
suomen kanssa tasoissa. Onko tulevaisuuden-
kuvamme siis englanninkielinen Suomi? Sen
ajatuksen kanssa voi tietysti elää, mutta se tar-
koittaa mm. sitä, että meille jää kulttuuriperin-
nöksi suuri määrä suomenkielistä kirjallisuutta,
jota ei ole käännetty muille kielille ja jota ku-
kaan ei sitten enää ymmärrä. Samoin elokuvia,
äänilevyjä ja ääninauhuja. Jälkeläisillämme on
kovin ohut kulttuuriperintö, jos kukaan ei enää
ymmärrä suomenkielistä aineistoa.

Mitä lainsäädäntö turvaa kielelle?

Valtiovallan ei varmaankaan tule, ainakaan lii-
kaa, säädellä sitä, mitä kieltä yksityiset ihmi-
set tai yritykset käyttävät. Jos parturi haluaa
mainostaa toimintaansa vaikkapa latinan kie-
lellä, niin miksipä sitä kieltämään, ja jos minä
sitten haluan vielä mennä kyseiselle parturil-

le selostamaan juuri latinan kielellä, millaisen kampauksen haluan, miksipä sitä kieltämään. Viranomaistoimintaa säädellään kielilaila monin tavoin. Siinä on määräyksiä kansalliskielistä suomesta ja ruotsista, ja saamen kielilaki on erikseen. Muiitten kielten käytöstä ei ole säädetty erillisillä kielilaeilla. Viime vuosina kuitenkin joihinkin lakeihin on ilmestynyt myös mainintoja englannin kielestä.

Suomen valtio tarjoaa monenlaista palvelua englanniksi. Esimerkiksi monien viranomaisten hakemuslomakkeet ja verkkosivut ovat saatavilla myös englanniksi. Erilaisia hallinnon tuottamia tiedote- ja esitemateriaaleja on myös englanniksi. Tämä on tietysti aika paljon käytännön välttämättömyys, sillä viranomaisiin tulee kuitenkin ulkomaalaisia kyselemään englanniksi tietoa, eikä ehkä ole kovin suuri asia, että tietoa sitten jo valmistellaan englanninkieliseksi.

Sen verran kielilaki sitoo myös yksityisten toimijoiden kielivalintoja, että kauppatavarassa, jossa on lain mukaan oltava tuoteseloste, käyttöohje tai varoitus, on tämä teksti kielilain mukaan oltava suomeksi ja ruotsiksi. (Periaatteessa yksikielisessä kunnassa riittää yksikin kieli, mutta käytännössä kai ne painetaan useimmiten kaikkiin pakkauksiin saman tien molemmilla.) Toki näitäkään ei kielletä olemasta myös muilla kielillä, esim. juuri englanniksi.

Viime vuosina joihinkin lakeihin on ilmestynyt mainintoja englannin kielestä. Esimerkiksi patenttihakemuksen voi nykyään, ihan lain voimalla, tehdä englanninkielisenä, ja pyytää siihen myös päätökset englanninkielisinä, eräitten elintarvikkeitten ulkomailta tuontia säätelevissä asetuksissa hyväksytään eläinlääkintätodistukset englanninkielisinä, arvonlisäveron palautushakemuksen voi tehdä englanniksi. Lainsäädännön nettietokannasta www.finlex.fi voi kokeilla: Hakusanalla ”englannin” löytyy 31 osumaa, osa tosin on kielikoulutusta ja kielenkääntämistä koskevia, mutta aika monta sellaistaakin viranomaistoimintaa koskevaa lainkohtaa, joissa määräys ei koske kieltä sinänsä, vaan joissa englannin kieli vain on tuotu vaihto-

ehdoksi suomen- ja ruotsinkielisen viranomais-toiminnan rinnalle.

Nämäkin ovat osaltaan polkuja kohti yllä kuvattua kielenvaihtumista. Mietitäänpä esimerkiksi tilannetta, jossa keksijöille tulee tavaksi tehdä patenttihakemuksensa englanniksi. Se voi olla hyvinkin houkutteleva tie, jos niin saa samalla vaivalla keksinnölleen tehdyksi valmistelutyön muittenkin maitten markkinoille viemistä varten. Mutta jos patenttihakemus on dokumentoitu vain englanniksi, niin onko sen jälkeen suomen kielen käytölle mitään sijaa tuotteen teollisessa valmistuksessa? Onko silloin olemassa suomenkielistä terminologiaakaan tuotteen valmistusta ja käyttöä varten?

Lainsäädäntömme tila tarkoittaa sitä, että Suomi on faktisesti jo muuttunut jossain määrin kolmen virallisen kielen maaksi, englanti on yhtenä virkakielenä suomen ja ruotsin rinnalla. Se on tapahtunut ilman, että asiasta olisi käyty avointa keskustelua ja tehty sellaista tietoista linjapäättöstä, että myös englanti on tässä maassa virallinen kieli.

Olisiko syytä säätää Suomeen englannin kielilaki, jossa eksplisiittisesti määriteltäisiin, että eräissä viranomaistoiminnoissa käytetään myös englantia? Samassa laissa voitaisiin säätää, että missä viranomainen käyttää englantia, on samalla viranomaisella erityinen velvollisuus huolehtia myös kansalliskielillämme tapahtuvasta saman alan tiedottamisesta.

Kohti englanninkielistä koulutusta?

Kansainvälistymisen paineissa eri oppilaitoksiin on viime vuosina yhä enemmän perustettu englanninkielisiä koulutusohjelmia. Oman kielellemme tulevaisuuden kannalta tätä voi pitää vakavampana kuin sitä, että viranomaistoimintaa on englanniksi. Viranomaistyöhän ei kuitenkaan koske kovinkaan monien päivittäistä elämää, eikä se suoranaisesti syrjäytä suomea (tai ruotsia) mistään. Mutta koulutus koskee käytännössä jokaista, ja kun koulutus tapahtuu englanninkielisessä koulutusohjelmassa, niin se tapahtuu sitten vain englanniksi, ei rinnakkain eri kielillä.



Koulutuksen kielenvaihdossa pätee pääpiirteissään sama, mikä yllä on todettu kielenvaihtumisesta yleisesti ja viranomaiskieleemme tilanteesta: olemme kulkeneet hyvän matkaa sitä tietä, jonka lopussa voi odottaa kielen peruuttamaton vaihtuminen, ja kaikki on tapahtunut askel kerrallaan ilman, että olisimme missään vaiheessa tehneet sitä päätöstä, että haluamme muuttua englanninkielisiksi. Erityisesti koulutuksen suhteen on kuitenkin todettava, että tilanteella, jossa kansa puhuu kotikielensä yhtä kieltä, mutta koulutus tapahtuu muulla kielellä, on kansaa jakavaa vaikutusta, koulutuskieli koetaan arvokkaampana ja sen osaaminen katsotaan ihmisen oman arvon mittariksi.

1900-luvun alkupuolella suomalaisilla oli määrätietoinen pyrkimys rakentaa maahan sellainen koulutuslaitos, jossa suomi on kaikkien alojen käyttöön sopiva sivistyskieli ja jolla voi suorittaa korkeakoulutuksenkin. Se pyrkimys toteutettiin ja saatiin omalla kielellä ja omilla ehdoillamme toimiva koulutuslaitos. Kansatunsi olevansa yhtä, kaikki puhuivat samaa kieltä, oli sitten kouluttamaton tai korkeasti koulutettu, eivätkä ruotsinkielisetkään ole pitkään aikaan enää erottuneet erillaiseksi yhteiskuntaluokaksi, kun molemmilla kansalliskielillä on rinnakkain ylimmälle tasolle asti toimivat koulutusväylänsä. Nytkö olemme sitten hylkäämässä tuon saavutuksen ja vaihtamassa koulutuksemme vieraskieliseksi?

Miten tästä eteenpäin?

Kotuksen kielipoliittisen ohjelman julkaisusta on kulunut nyt kolme vuotta. Pelkkänä Kotuksen julkaisuna sillä ei paljoa vaikutusta ole, asia olisi otettava poliittisten elinten keskusteluun ja käsittelyyn, jos halutaan muodostaa kielipolitiikalle konkreettisia suuntaviivoja. Juuri näinä kolmena vuonna lakeihin ovat ilmestyneet monet yllä mainitut englannin asemaa määrittelevät säädökset.

Mistä siis lähtisi aloite siihen, että kielipolitiikka ihan vakavasti otettuna tulisi esille?

Kieltämällä englannin kielen käyttöä emme pääse pitkälle. 1900-luvun alussa meiltä yritettiin kieltää suomen kielen käyttö ja tuoda venäjä tilalle. Emmehän me siihen suostuneet, emmekä me varmaankaan englantiakaan kieltämällä jättäisi käyttämättä.

Kyllä nykymaailmassa joka tapauksessa verkostoidutaan kansainvälisesti, ja jos englanti on maailmassa laajalti osattu kieli, niin silloin usein verkostoidutaan englanniksi. Mutta olisi ainakin mahdollista uskoa, että voi olla sellainenkin tapa verkostoitua kansainvälisesti, että suuremman kielialueen kieli ei niin selvästi uhkaksi syrjäyttää omaamme. Onkohan sellaiselle idealle nimikin? Esperanto?

Mikko Mäkitalo

[* http://scripta.kotus.fi/www/verkkojulkaisut/julk7/suomen_kielen_tulevaisuus_kotus_verkkojulkaisuja_7.pdf]

Kutsu vuosikokoukseen

Suomen opettajien esperantoyhdistys ry:n (ELFI) sääntömääräinen vuosikokous pidetään 16. maaliskuuta 2013 klo 10.00 alkaen Pengersalissa (osoite: Pengerkatu 11 A 3, Helsinki). Käsitellään vuosikokoukselle kuuluvat asiat. Kaikki jäsenet tervetuloa!

Johtokunta

Kunvoko al la jarkunsido

Laŭstatuta jarkunsido de **Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj** (ELFI) okazos sabaton la 16an de marto 2013 je la 10 en Pengersali en Helsinki (adreso: Pengerkatu 11 A 3). Estos traktataj laŭstatutaj jarkunsidaj aferoj. Ĉiuj membroj estas bonvenaj!

La estraro

Suomen Kristillisen Esperantoliiton kokous

pidetään Pengersalin (osoite EAF:n Talvipäivien ilmoituksessa) tiloissa Helsingissä 16.3.2013 klo 17 Suomen Esperantoliiton Talvipäivien yhteydessä.

Asia: liiton lopettaminen. Sääntöjen mukainen toinen käsittely. Ensimmäinen käsittely oli Riihimäellä tänä vuonna. Riihimäen kokouksessa myönnettiin rahastonhoitajalle hänen pyytämänsä ero. Puheenjohtaja *Olavi Kantele* kuoli huhtikuun lopulla.

Sääntöjen mukaan, jos toisessakin käsitellyssä päädytään liiton lopettamiseen, jäljellä olevat rahat talletetaan suomalaiseen rahalaitokseen kolmeksi vuodeksi, jonka jälkeen, jos uutta liiton aktivoitumista ei ole tapahtunut,

varat siirretään EAF:lle käytettäväksi Suomen Kristillisen Esperantoliiton tarkoituksen mukaisesti.

Pyydän kaikkia niitä esperantisteja, jotka ovat kuuluneet Suomen Kristilliseen Esperantoliittoon tai ovat valmiita jatkamaan sen toimintaa saapumaan kokoukseen paikalle.

Suomen Kristillisen Esperantoliiton vuoden 2012 hallitukseen valittu, jäsenmaksunsa maksanut jäsen.

Synnöve Mynttinen
synnove.mynttinen@phnet.fi, 044 532 8121,
Rullakatu 6 as 11, 15900 Lahti

Fabelkonkurso 2012

Je la 18-a de oktobro 2012 okazis la premio-festo de *Napero-Finlandia* – fabelkonkurso por infanoj organizita de *Pääatalo*-institutito en Tai-vaalkoski, Finnlando.

La finnlingvan konkurson venkis *Aarni Immonen* el la urbo Nokia. Al la esperanta parto de la konkurso venis unu fabelo el Kubo. La fabelo estis skribita kiel gruplaboro. La konkursoj estas *Juan Carlos Triana Alfonso*, *Marcos Antonio Alzugaray Martinez*, *Laura Isabel Moreno Misia* kaj Karlo Lutermano. La fabelo nomiĝas *Ĉokolino*. Libropremioj iros al Kubo, dankon kaj gratulon al la kubanoj!

Venontjare okazos denove nia tutmonda fabelkonkurso. **Limdato estos la 15-a de septembro 2013.** Estas kvar kategorioj: A: ĝis 9-jaraĝuloj, B: 10–11-jaraĝuloj, C: 12–13-jaraĝuloj kaj kategorio Grupoj.

Bonvolu informi la gvidantojn de la infan-grupoj. La konkursoj estu sendota al la adreso: Esperanto-Societo de Oulu
 Väärjärventie 26 A
 FI-93590 Vanhala
 Finnlando.

Aŭ rete: aini.esp@hotmail.com

Napero-Finlandia-konkurso estas nun 20-jaraĝa kaj estas pli ol 50 000 fabeloj skribitaj de infanoj en la arkivo de *Pääatalo*-institutito. Esperantlingvaj fabeloj estas 130 en la arkivo. Nun estas *Napero-Finlandia*-konkurso elektita kiel kandidato de internacia *Astrid Lindgren* -premio. Ni atendas pozitivan rezulton!

Aini Vääräniemi
Esperanto-Societo de Oulu
Aranĝanto de la Tutmonda fabelkonkurso por infanoj

La 79-a Esperantokongreso en Italio

La 79-a Itala Esperanto-Kongreso okazis en Mazaradelvalo (Mazzara-del-vallo) (Sicilio) ekde la 18.08.12 ĝis la 25.08.12. Mazaradelvalo situas ĉe la suda bordo de la insulo Sicilio. Ĉi tiu ĉarma mezepoka urbo estas ideala loko por ferioj, ĉar ĝi havas multajn belajn vidindaĵojn, interesan historion, bonajn restoraciojn kaj belajn plaĝojn por naĝi. Dum la kongreso la vetero estis bona kaj tute ne pluvus. La temperaturo eble estis iom tro varma por skandinavoj kaj nordeŭropanoj.

Mazaradelvalo havas vere interesan historion. Ĝuste tie, en Sicilio, centre de Mediteraneo, dum multaj jarcentoj kaj jarmiloj interkruciĝis la vojoj de multnaciaj navigistoj, kiuj riskis siajn vivojn pro la konkero de novaj teritorioj. Indiĝenaj loĝantoj estis anstataŭigitaj per grekoj, araboj, romianoj kaj normanoj. Ĉiuj volis uzi la oportunan naturan havenon, kreiĝintan per la kunfluo de la rivero Mazar kun la Mediteraneo. Ĉiuj ankaŭ lasis siajn spurojn en la kulturo de la Sicilia insulo. Ankoraŭ nun konsista parto de ĝia loĝantaro estas arabdevena kaj arablingva, heredo de granda enmigrado en la sesdekaj jaroj. La ideala haveno de Mazaradelvalo estas uzata ekde la antikvo por ŝipoj kaj barkoj. Ekde tiam ĝis hodiaŭ, la haveno estas vere sekura loko por ŝipoj.

Eeva kaj mi alvenis al la kongresejo Hotelo *Hopps* en Mazaradelvalo malfrue en la dimanĉa vespero la 19.8. La vespermanĝo estis preskaŭ finita, sed ni sukcesis ricevi ankoraŭ sufiĉe da manĝaĵo kaj iom da vino. Bedaŭrinde ni tute perdis



*Synnöve, Sirkka, Eeva kaj Tatu.
Foto: Jukka Nikoskelainen*

la kongresan programon de la sabato kaj dimanĉo. Hotelo *Hopps* bone povis gastigi, tranoktigi kaj manĝigi 328 partoprenantojn de la kongreso. Sur la korto de la hotelo estis granda naĝejo, kie oni povis refreŝigi dum aŭ post la kongresa programo. La hotelo situas ĉe la marborda bulvarado kiu longas multajn kilometrojn. Dimanĉe vespere la bulvarado estis plenena de homoj – tutaj familioj kun geavoj kaj genepoj. Familioj promenadis aŭ sidis sur la benkoj kaj trinkis sukon aŭ ŝaŭmvinon. Laŭlonge de la plaĝejo estis multaj bandoj ludantaj kaj kantantaj italan muzikon. La publiko kunkantis kaj dancis sur la strato. Ankaŭ ni dancis kun aliaj dancantoj. Ĉi tiu vespero estis vere ĉarma komenco de nia kongresa vizito.

La Itala Esperanto-Federacio ricevis propran oficejon de la urbo Mazaradelvalo en la Palaco de Jurrespekto. En la impona Palaco estis ampleksaj kunvenaj kaj instruaj spacoj kaj salonoj. Tie estis en januaro 2012 elmontrita granda

panela ekspozicio pri Esperanto de 35 paneloj. Tiu evento estis vizitata de pluraj dekoj da lernejoj klasoj, kiuj ricevis rakonton pri Esperanto de Bruĉjo Kasini. La Itala Esperanto-Federacio kreis en la Palaco Centron por Esperanto kaj Interkulturo. Ĉi tiu centro apogis la kursojn pri la Internacia Lingvo kiujn la lernejoj de la urbo decidis elprovi. La rezultoj estis entuziasmigaj: kursoj al 600 infanoj en sep el 12 lernejoj de la urbo kaj al kvindeko da plenkreskuloj, specife instruistoj kaj oficistoj. La lernejoj petas trioble pli da kursoj por la sekvanta lernojararo. La temo de la 79-a Esperanto-Kongreso estis la vortoj de Zamenhof "Sed homoj kun homoj". Fakte Zamenhof diris, ke per Esperanto renkontiĝas ne francoj kun angloj aŭ rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj. Tiu principo, ke Esperanto estas ne nur lingvo, sed ilo por igi ciujn homojn egalaj, estas tre aktuala ankaŭ nun, kiam nia lingvo festas sian 125-jaran ekziston ĉi-jare. Pri ĉi tiu temo "Sed homoj kun homoj" estis seminarioj ripetitaj 6 foje dum la kongreso, por ke ĉiuj havu eblecon partopreni la seminarion.

Antaŭ la kongreso *Katalin Kováts*, konata hungara matematikistino kaj lingvistino, kiu aktive laboras por la plibonigo de la Esperanta instruado, faris 4 metodikajn trejnseminariojn pri lingvoinstruado. Dum la kongreso ŝi faris ankoraŭ 8 duontagajn trejnseminariojn pri la sama temo. Kia nekredbla laboro! Dum la kongreso estis organizataj 4 fojoj kun kaj ILEI-kaj KER-ekzamenoj. Principe ĉiuj kongresanoj povis ekzameniĝi en sia nivelo de Esperanto laŭ sia deziro. La Esperanto-Kongreso havis brilan sortimenton de koncertoj, prelegoj, lecionoj, ekskursoj kaj renkontoj. En la kongresejo oni povis aĉeti kaj sendi poŝtkartojn specife preparitajn por la okazo kun speciala poŝta stampo.

En ĉiuj kongresaj tagoj estis ankaŭ organizitaj tuttagaj aŭ duontagaj ekskursoj al diversaj interesejaj lokoj kun historiaj vidindaĵoj. Ni partoprenis en du tuttagaj ekskursoj. La unua estis en mardo la 21.8. al Agriĝento kaj la Valo

de Temploj. Samtage faris la urbestro de Mazaradelvalo, *Nicolò Cristaldi*, ekstreme interesan promenadon tra la historia urbocentro. En tiu evento ni badaŭrinde ne povis partopreni. Li rakontis plurajn historiojn de la labirinta urbocentro de arabstilaj vojetoj. Unu el la urbocentraj vojetoj estis inaŭgurita kun ampleksa panelo de fajncoj (kaheloj) pri la lingvo kaj movado de Esperanto, verkita de infanoj de la Arta Liceo de Ankonono.

Nia dua tuttaga vizito al Palermo, Monreale kaj Piana de la albanoj estis aranĝita en merkredo, la 22-a aŭgusto. Ambaŭ ekskursoj estis vere sukcesaj, kaj la ĉiĉeronoj estis senkomparaj, ĉiuj parolis bonan kaj belan Esperanton. Specife indas mencii ke dum la merkreda aŭtobusa vojaĝo *Ranieri Clerici*, kiu ankaŭ funkciis kiel samtempa tradukisto Itala-Esperanto por itallaprolantaj ĉiĉeronoj, rakontis en bela Esperanto longajn kaj vere interesajn kaj surprize detalajn prelegojn pri la Sicilia historio en komparo kun la hodiaŭa vivo.

Bonaj sociaj programoj okazis ĉiuvespere ĝis meznokto. *Michael Boris Mandirola* organizis ĉiuvespere programojn. En sabato estis Interkona Nokto, kie eblis konatiĝi kun aliaj partoprenantoj de la kongreso. En dimanĉo estis Internacia Manĝfestivalo kun la budo al kiu ĉiuj povis kunporti tipajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el sia lando kaj rakonti pli detale pri ili.

La Grupo Kajto kun *Nanne Kalma* kaj *Ankie van der Meer* estis tre ĉarmaj personoj kun kiuj ni unufoje havis la plezuron vespermanĝi kaj havi longajn kaj interesajn konversaciojn. Ili prezentis esperantlingvajn kantojn vespere en la kongresejo kaj subĉiele en la centra placo de Mazaradelvalo je mardo la 21.8. En la sama vespero tie estis prezentitaj kelkaj esperantoinstruistoj de lokaj lernejoj kaj ankaŭ premiitaj la plej diligentaj kaj sukcesaj lernantoj de Esperanto. Tiun solenaĵon kondukis Bruĉjo Kasini.

La kongresa libroservo estis vere ampleksa kaj multflanka kun centoj da malnovaj kaj



dekoj da tute novaj libroj. Estis ankaŭ interesaj libroprezentadoj dum la kongreso. En mardo la 21.8. estis prezentita la libro de akdemiano,



Prezentado de 'Pri homoj kaj verkoj': *Michaela Lipari, Carmel kaj Josephine Mallia.*

Foto: *Jukka Nikoskelainen*

profesoro, verkisto kaj tradukisto *Carmel Mallia* el Malto. La libro "Pri Homoj kaj Verkoj" ĉarmis multe *Jorma Ahomäki*. Li legis la libron jam kiam ĝi aperis kaj tial li volis legi ankaŭ aliajn esperantlingvajn librojn de Mallia, kiujn ni kunportis al Jorma el Mazaradelvalo.

La Finna kongresa grupo konsistis el *Synnöve Mynttinen, Sirkka Mattlin, Eeva kaj Jukka Nikoskelainen, Mervi Viteli-Hietanen kaj Tatu Lehtilä* el Svedio.

Ni reveturis hejmen kun granda deziro de nove viziti tiun beleegan kaj gastaman insulon Sicilion. Dankon al la italaj esperantistoj, kiuj tiel bone organizis la kongreson. Ni antaŭĝojas la venontjaran 80-an Italian Esperanto-kongreson en Liguria, en Sanremo Kastelaro de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto 2013.

Jukka Nikoskelainen
Turku

Esperanto-Gården ricevis novan estraron



Estraranoj, de maldekstre: Tomas Jansson, Lennart Svensson, Anna Ritamäki-Sjöstrand kaj Douglas Draper (fonto: esperantosverige.se)

La jarkunveno de la kooperativo *Esperanto-Gården* (Esperanto-Domo en Lesjöfors, Svedio) sabate la 13an de oktobro elektis estraron, kiu sekvatage inter si elektis la funkciulojn.

Nova prezidanto estas *Anna Ritamäki-Sjöstrand*. Vicprezidanto elektiĝis la antaŭa prezidanto

Lennart Svensson, kiu ankaŭ prizorgas la praktikaĵojn de la gastigejo. *Tomas Jansson* estas nova sekretario. Daŭrigas en la estraro *Jan Svensson* kaj la kasisto *Anders Rylander*. Vicestraranoj estas *Hokan Lundberg* (nova) kaj *Douglas Draper* el Oslo.

La jarkunveno donis al *Bengt Nordlöf* la taskon esti kunvokanto de la elektoprepara grupo. Li ankaŭ plenumas la rolon de konstanta estrara konsilanto.

Inter la prioritatoj de la nova estraro troviĝas organizado de multflanka somera esperantokurso en la julia semajno 29 (la semajno antaŭ la Universala Kongreso en Rejkjaviko).

La nova prezidanto estas kontaktebla per la retadreso: anna.ritamaki@kolumbus.fi

Anna Ritamäki-Sjöstrand

Esperanto-societo Antaŭen informas

Antaŭen havis siajn elekto- kaj estrarkunvenojn la 19-an de novembro. Estraranoj por la jaro 2013 estos jenaj:

- *Jukka Laaksonen*, prezidanto
- *Sylvia Hämäläinen*, vicprezidanto
- *Tapani Aarne*, sekretario/kasisto
- *Lauri Liukkonen*, estrarano
- *Veli Hämäläinen*, estrarano
- Vicestaranoj: *Terhi Laaksonen*, *Marjatta Ström*, *Markus Sunela* kaj *Pentti Järvinen*.
- Agadkontrolantoj: *Anja Karkiainen* kaj vice *Erkki Kempainen*.

Eventoj en la jaro 2013 en la klubejo "Nesto":

- 07.01. je la 17: Januara vespero
- 04.02. je la 17: Februara vespero
- 18.02. je la 17: Jarkunveno
- 04.03. je la 17: Marta vespero
- 08.04. ja la 17: Aprila vespero

En junio estos ekskurso. Bv. vidi precize pri temoj de vesperoj ktp. ĉe la retejo de Antaŭen: www.esperanto.fi/tampere/Ohjelma

La estraro

Elekto de komitatanoj B

En la decembra "Esperanto" aperas oficiala alvoko pri kandidatiĝoj por la elektado de la komitatanoj B [reprezentantoj de individuaj membroj] de UEA por la periodo 2013–2016. La anonco estis dissendita ankaŭ kiel gazetara komuniko: <http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=481#2>

Por plifaciligi la kolektadon de apogantoj (minimume 10 el minimume 3 landoj) ekzistas formularo, elŝutebla por surpaperigo ĉe <http://www.uea.org/pdf/Kandidatigilo-B.pdf>

La formularo havas lokon por kvin subtenoj. Ne gravas, ĉu kandidato sendos du plenajn for-

mularojn aŭ dek formularojn kun po unu apogo. Ankaŭ ne estas devige, ke la kandidatoj sendu la formularojn, sed la apogantoj rajtas mem rekte sendi ilin al la CO. Krome, la uzo de la formularo ne estas deviga; la formularo nur celas plifaciligi la aferon.

La kandidatigaj dokumentoj devas atingi la Centran Oficejon plej laste la 28-an de februaro. Tio ŝajnas fora dato, sed estas pli bone rapidi kaj ne lasi la aferon ĝis la lasta momento.

Osmo Buller
ĝenerala direktoro de UEA

La 2a tutmonda KER-ekzameno

Venis informo de *Katalin Kováts* pri venontjara tutmonda ekzamentago. ELFI ankoraŭ ne decidis ĉu aranĝi tiun en Finnlando. Nun ni volas aŭdi, ĉu ekzistas intereso inter niaj membroj. La ekzameno okazus sabaton la 8an de junio 2013. Ĉi-foje ĝi estos ne nur skriba, sed ankaŭ parola, se al iu eblas aranĝi tiun flankon de la ekzameno.

La ekzameno temas pri internacie agnoskata lingvoekzameno, kiun aranĝas lingva instituto de Budapeŝta universitato ELTE. Ĝi

kreas la ekzamenojn ankaŭ de aliaj lingvoj. Se vi volas havi pliajn sciojn pri la ekzameno, ili estas troveblaj en <http://edukado.net/novajhoj?id=296>

Se vi interesiĝas fari la KER-ekzamenon, sendu vian deziron al *Sylvia Hämäläinen*, sylvia.h@kolumbus.fi F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 TAMPERE. Rimarku, ke ĉi tio ne estas aliĝo al la ekzameno, sed nur montrado de intereso.

Sylvia Hämäläinen

Vintraĵ Tagoj – Talvipäivät

16.–17.3.2013

Kunveneĵo: salono Pengersali, adreso: Pengerkatu 11 A 3, Helsinki
Temo: Literaturo kaj cetera kulturo, *aihe:* Kirjallisuutta ja muuta kulttuuria

Vintraĵ Tagoj okazos en Helsinki, en la semajnfino de 16-a ĝis 17-a de marto 2013. Loko estos en la urboparto *Kallio*, en la bela kunveneĵo *Pengersali*, kiun ni kun helpo de nia aktiva membroasocio *Steletto* nun jam la duan fojon povas utiligi.

La estraro decidis ĉi-foje iom rearanĝi la kuintiman tagordon de la tagoj: tiel la jarkunveno

okazos jam sabate 16.3. kaj dimanĉe estos turisma programo. Ni havos la ĝojon bonvenigi al Helsinki *Osmo Buller*, direktoron de la Centra Oficejo de Universala-Asocio de Esperanto en Roterdamo. Li prelegos kaj rakontos al ni pri aktualaĵoj en la Esperanta mondo.

Sabatvespere ni havos literaturan vesperon, kie ĉiuj povos rakonti pri siaj plej ŝatataj libroj (nature esperantlingvaj), ĉu poemaj aŭ prozaj; ĉu detektivaj, romantikaj, dokumentaj, seriozaj, sciencfikciaj – la elekto estas via.

Dimanĉe ni konatiĝos kun la vivo kaj hejmo de nia multjara prezidento, s-ro *Urho Kekko*



Programo – Ohjelma (*ŝanĝoj eblas - muutokset mahdollisia*)

Sabato / Lauantai, 16.3.2013

10.00–12.00 Kunveneĵoj de membroasocioj de EAF laŭ alvokoj. Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöjen kokouksia.

12.00–13.00 Lunĉo memstare. Lounas omatoimisesti.

13.00–14.30 Malfermo de la Tagoj. Prelego de Osmo Buller pri aktualaj UEA-aferoj. Päivien avaus. Osmo Buller Esperanton maailmanliitosta kertoo ajankohtaisista asioista.

14.30–15.00 Kafo. Kahvi.

15.00–17.00 Jarkunveno de EAF (komence kontrolo de rajtigiloj). Suomen Esperantoliiton vuosikokous (aluksi valtakirjojen tarkastus)

17.00–18.00 Paŭzo. Kunveneĵoj laŭ alvokoj. Tauko. Kokouskutsujen mukaisia kokouksia.

18.00–18.30 Komuna vespermanĝeto (picoj, salato, ktp). Yhteinen iltapala (pizzaa, salaattia yms).

18.30–20.30 Literatura vespero: rakontu kaj eventuale kunportu viajn plej ŝatatajn librojn. Komuna teatraĵeto "La botistoj". Kirjallisuusilta: ota mukaasi, jos mahdollista, esperantokieliiset lempikirjasi ja kerro niistä. Näytellään yhdessä

Nummisuutareita.

Dimanĉo / Sunnuntai, 17.3.2013

10.00–10.55 Renkontiĝo(j) ĉe haltejo de buso 24 apud *Kiasma*, halteja nomo: *Lasipalatsi por komuna ekiro al Tamminiemi.* Tapaamisia pienryhmissä museoon menoa varten, kokoontumispalkka *Kiasman* bussipysäkki (nimi *Lasipalatsi*), bussi nro 24.

10.30–10.55 Kolektiĝo ĉe la muzea pordo de Tamminiemi. Kokoontuminen Tamminiemen museon portille adreso/osoite: *Seurasaaarentie 15.*

11.00–12.00 Vizito kun finnlingva ĉiĉerono en Urho Kekkonen-muzeo, Tamminiemi. Aliĝo necesas! Tutustuminen suomenkielisen oppaan kanssa *Urho Kekkonen* museoon Tamminiemessä. Ilmoittautuminen tarpeen!

12.30–14.00 Lunĉo mempagenda en proksima restoracio (nomo anoncita poste). Diskutado i.a. kun *Osmo B.* Aliĝu! Yhteinen lounas omakustanteisesti läheisessä ravintolassa (nimi ilmoitetaan myöhemmin). Keskustelua mm. *Osmo B:n* kanssa. Kerro jos olet tulossa mukaan!

14.00– Bonan hejmoĵaĝon! Hyvää kotimatkaa!



nen: la prezidenta rezidejo kaj hejmo en *Tamminiemi*, Helsinki, post lia morto estis aranĝita muzeo. Ĝi estis renovigita 2009–2012 kaj nun denove akceptas al gvidataj vizitoj.

La manĝojn ni ĉi-jare prizorgos memstare: La estraro de EAF preparos kafon kaj vespermanĝeton en Pengersali, kaj ambaŭtage lunĉojn, kiujn ĉiu pagu mem. Dimanĉe ni povos kolektiĝi en komuna manĝejo proksime al Tamminiemi – informu nin, se interesas vin kunesti.

Talvipäivät pidetään 16.–17.3.2013 Helsingissä. Paikka on Helsingin ja Uudenmaan Näkövammaisten Pengersali, jonka saimme aktiivisen jäsenjärjestömme Steleton avulla käyttöömmek me jo toisen kerran vuoden aikana. Tämä kaunis sali oli viime kesänä kansainvälisen esperantotutkinnon pitopaikkana.

Tällä kertaa hallitus on hieman muuttanut päivien tavanomaista kulkua: Liiton vuosikokous pidetään jo lauantaina 16.3. ja sunnuntaina ohjelmassa on museokäynti. Toivotamme iloisena tervetulleeksi *Osmo Bullerin* Esperanton maailmanliiton päämajasta, hänellä on varmasti mielenkiintoista kerrottavaa esperantomailmasta. Lauantai-illan ohjelmassa on kirjallisuusilta, jolloin jokainen voi kertoa esperantokielisestä lempikirjastaan tai useammastakin teoksesta. Kirja voi olla runokirja, proosaa, dokumenttiteos, dekkari, sarjakuva tai mikä muu tahansa, kunhan kieli on se oikea.

Sunnuntaina tutustumme juuri kunnostettuun Urho Kekkosen museoon Tamminiemessä. Suomenkielinen opastus alkaa klo 11.00 ja sitä ennen kokoonnutaan Tamminiemen portilla, joka on Seurasaareen vievän sillan pielessä. Ilmoittaudu ja tule ajoissa paikalle. Yhteinen lähtö bussilla nro 24 Kiasman lähellä olevalta pysäkiltä, tarkempi kellonaika sovitaan lähtijöiden kesken.

Myös ruokailut ovat tällä kertaa omatoimisia: Liiton hallitus huolehtii kahveista ja iltaruoasta Pengersalilla, lounaat maksetaan itse. Kerro jos haluat mukaan yhteiselle lounaalle sunnuntaina, etsimme sopivan ravintolan Tamminiemen läheltä.



ALIĜILO



Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 16.–17.3.2013 en Pengersali, Helsinki.

Nomo: _____

Adreso: _____

Tel./Fakso/Ret-adreso: _____

Aliĝkotizo (enhavas muzean viziton):

15 EUR..... ĝis 28.2.2013 ____

20 EUR..... poste 28.2.2013 ____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

VT-manĝopaketo: 20 EUR ____

(inkl. kafon kaj vespermanĝeton en Pengersali-salate; tranoktejon kaj ceterajn manĝojn ĉiu prizorgu mem).

Muzea vizito dimanĉe: ____

(aliĝo necesas)

Lunĉo dimanĉe: ____

(pago surloke, ni petas aliĝon por scii kiom da lokoj necesas).

Entute pagenda al la konto de EAF: _____

Pagoj al la konto:

Danske Bank FI11 8000 1700 2308 25

Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640 (ne skribu aliajn informojn en la pagilo).

Pliaj informoj aŭ deziroj al EAF: _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarenkatu 15 C 65

FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

BONVENON!



Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson eafmendoj@esperanto.fi. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio uzante la referencnumeron. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: kaj pagi kaj sendi la aliĝilon por ke ni organizantoj scios, kiu volas kion dum la VT. Treege gravas aliĝo por dimanĉa muzea vizito!

Kun eventualaj demandoj vi povas turni vin al estraranoj de EAF. Pri programaj aranĝoj respondas *Paula Niinikorpi* kaj *Tiina Oittinen*. Kiel ĉefurbanoj *Keke Uber*, *Päivi Saarinen* kaj *Tiina Kosunen* povos helpi koncerne al veturiloj kaj tranoktejoj kaj manĝejoj en Helsinki.

Koncerne jarkunvenaj demandoj estas je via dispono *Tuomo Grundström*. Päivi Saarinen kune kun Tiina Kosunen prizorgas pri la aliĝiloj kaj pagoj. Kontaktinformojn de ĉiuj sur paĝo 2.

Bonvenon!

Ilmoittaudu lähettämällä lomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kertomalla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen eafmendoj@esperanto.fi. Maksa osallistumis- ja pakettimaksu ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. Muista käyttää viitenumeroa, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot, jotta tiedämme mitä olet tilannut ja milloin tulet. Erityisen tärkeää on ilmoittautua sunnuntain museokäynnille!

Talvipäiviin liittyviä asioita voi kysyä liiton toimihenkilöiltä seuraavasti: Ohjelma ja ruokailut Pengersalissa Paula Niinikorpi ja Tiina Oittinen (museokäynti). Liikenneyhetydet, majoittuminen ja ruokailut Helsingissä: Keke Uber, Päivi Saarinen ja Tiina Kosunen (kaikki pääkaupunkiseudulta).

Vuosikokous, omien kokousten tilavaraukset: Tuomo Grundström kaj Tiina Oittinen. Maksuasiat: Päivi Saarinen ja Tiina Kosunen. Kaikki- en yhteystiedot ovat lehden sivulla 2.

Tervetuloa!

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville 16.–17.3.2013 (Pengersali, Helsinki).

Nimi: _____

Osoite: _____

Puh./fax/sähköposti: _____

Ilmoittautumismaksu (sis. museokäynnin):

15 e.....28.2.2013 asti _____

20 e.....28.2.2013 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Talvipäivien ruokapaketti: 20 e _____

(sisältää kahvin ja iltaruuan lauantaina Pengersalissa, muut ruoat samoin kuin majoituksen jokainen hoitaa itse).

Museokäynti sunnuntaina: _____

(ilmoittautuminen välttämätön).

Lounasvaraus sunnuntaina: _____

(maksetaan paikalla, ilmoittautumista pyydetään paikkamäärän varmistamiseksi).

Maksut yht. Suomen Esperantoliiton

tilille: _____

Tilinumero:

Danske Bank FI11 8000 1700 2308 25

Käytä viitenumeroa 4640 (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia: _____

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto

Siltasaarekatu 15 C 65

FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse eafmendoj@esperanto.fi

TERVETULOA!

Alvoko – Kutsu – Kallelse

La laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos sabaton, la 16-an de marto, 2013 je la 15-a horo en Helsinko, en la kunvenejo de Pengersali, adreso: Pengerkatu 11 A 3. En la kunveno estos traktitaj la laŭstatutaj jarkunvenaj aferoj.

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen Esperantoliitto ry:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään lauantaina 16.3.2013 klo 15.00 alkaen Helsingissä, Pengersalin

kokouksilla, Pengerkatu 11 A 3. Kokouksessa käsitellään liiton sääntömääräiset vuosikokousasiat.

Esperantoförbundet i Finland håller sitt stadgeenliga årsmöte lördagen den 16.3.2013 kl. 15.00 i Helsingfors i Pengersalis mötesutrymmen, Terrassgatan 11 A 3. Mötet behandlar de i förbundets stadgar föreskrivna årsmötesärendena.

La estraro - Hallitus - Styrelsen

Anna-Liisa Heikkinen mortis

17.1.1938–18.11.2012

Honora membro de EAF, aktivulino kluba kaj oficeja, nia kara *Anna-Liisa* estas for. Ŝi forlasis nin subite, tute neatendite. En dimanĉo 18.11. kolektiĝis en ŝia hejmo gefratoj *Erkki*, *Anna-Liisa* kaj *Veikko* por intervjuo fare de studento esploranta pri spertoj de militrifuĝintaj infanoj. Dum la rememora konversacio, Anna-Liisa suferis malsanatakon, kaj revivigo malsukcesis.

Ŝi do pasigis la fruan infanecon parte en Svedio, kiu ofertis panon kaj sekurecon al infanoj en milittempo. Reveninte sepjara, ŝi lernis en svedlingvaj lernejoj kaj fariĝinte vartistino laboris en infangardeno, aktivante ankaŭ sindikate: Ŝi longe estis prezidantino de *Barnavårdarinneförening i Finland* kaj estis distingita per la ordeno de Finnlanda Blanka Rozo.

La komplete dulingva juna Anna-Liisa kaptis Esperanton kiel naturan aldonajon al

sia kulture kaj socie vasta mondo. Kie ŝi aperis, tie oni sentis ĉarmon de aparte vigla, bonvolema klera personeco. Jena historieto karakterizu ŝin: En la malfruaj sepdekaj jaroj okazis granda inundo en Ĉeĥoslovakio. Laboranto de Finnlanda kristana helporganizaĵo renkontis ŝokitan junan familion, kiu tuton perdis – la domo, ĉio forflorigita. Ili povis diri nur la nomon Anna-Liisa, esperanta amiko en Finnlando; sed adreso, ĉio en la domo estis perdita. Reveninte, tiu laboranto telefonis al la EAF-oficejo, trovis Anna-Liisa, kiu tuj kontaktis kaj organizis helpon al la malfeliĉuloj. La amikeco daŭris dumvive. La vivverko kaj kara memoro daŭras transvive.

Tuomo Grundström, Aini Vääräniemi



Sananlaskuviisautta III

Sananlaskuviisautta esperantoksi ja suomeksi – sisältö sama, mutta ei läheskään joka parissa sananmukaisesti. Yhdistä rinnakkaisten palstojen sanalaskut luku kirjaimeen tai päinvastoin.

Proverba saĝo finne kaj esperante – respondaj enhavoj, sed ne laŭvorte. Kunigu nombron kaj literon aŭ inverse. Ĉu (mal)facile?

Tuomo Grundström

a Ei kaikki ole kultaa mikä kiiltää.

b Onnettomuus ei tule yksin.

c Hän on astunut korkin päälle.

ĉ Tilaisuus tekee varkaan.

d Ei haukkuva koira pure.

e Joka vitsaa säästää, se lastaan vihaa.

f Ei määrä, vaan laatu.

g Sydämen kyllyydestä suu puhuu.

ĝ Älä potki tutkainta vastaan.

h Ei ole vielä korvantaustat kuivuneet.

ĥ Kukaan ei ole profeetta omalla maallaan.

i Markka on pätevin konsultti.

j Hän ei ole ruudinkeksijä.

ĵ Aikainen lintu jyvän löytää.

k Taipuu vaan ei taitu.

l Niin täällä sinkoilee miehen aatos, ja kukapa osaisi laitta esteitä sen tielle.

m Älä maalaa pirua seinälle.

n Hyvä omatunto on paras päänalunen.

o Kissa kiitoksella elää.

p Ruukku käy kaivolla kunnes särkyy.

r Se parhaiten nauraa joka viimeksi nauraa.

s Hätä keinon keksii.

ŝ Seinilläkin on korvat.

t Siperia opettaa.

1 Pli valoras kontenta spirito, ol granda profito.

2 Por via bono regalas vin bastono.

3 Pli bone fleksiĝi, ol rompiĝi.

4 Pensoj iras trans limo sen pago kaj timo.

5 Okazo faras ŝteliston.

6 Ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan.

7 Ne pentru diablön sur la muro.

8 Nenia peketo restas longe sekreto.

9 Ne kvanto, sed kvalito decidas pri merito.

10 Neniu estas profeto en sia urbetö.

11 Ne helpas glorkrono al malplena kaldrono.

12 Ne ĉio brilanta estas diamanta.

13 Ne batalu pot' el tero kontraŭ kaldrono el fero.

14 Mono mondon regas.

15 Mizero instruas.

16 Mizero faras lerta, mizero faras sperta.

17 Malfeliĉoj kaj batoj venas ĉiam kun fratoj.

18 Longe ĉerpas la kruĉo, ĝis ĝi fine rompiĝas.

19 Li pulvon ne elpensis.

20 Li havas ankoraŭ lakton sur la lipoj.

21 Li esploris iom la fundon de la glaso.

22 La parto plej vasta venos la lasta.

23 Koro pleniĝas – lango moviĝas.

24 Kiu venas plej frue, sidas plej ĝue.

Nova prezidanto por Esperanto-Gastigejo



Anna Ritamäki-Sjöstrand, eksa prezidanto de EAF estas nova prezidanto de Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors, la kooperativa societo Esperanto-Gården.

Lesjöfors situas en Vermlando, centre inter Gotenburgo, Stokholmo kaj Oslo. En Esperanto-Gastigejo, fondita en 1996, realiĝis interalie Kultura Esperanto-Festivalo, Internacia-Junulara Kongreso kaj Renkontiĝo de Esperanto-Familioj. Aŭtunaj Tagoj de EAF vojaĝis al Lesjöfors en 2005.

La tradicia somera esperantokurso realiĝos

en Esperanto-Gastigejo la 14an ĝis la 21a de julio 2013 por komencantoj, infanoj, daŭrigantoj kaj perfektigantoj. Eblos pluir de la kurso al la Universala Kongreso en Rejkjaviko.

Esperanto-Gårdens ordförande från Finland

Anna Ritamäki-Sjöstrand, tidigare ordförande för Esperantoförbundet i Finland valdes den 13 oktober 2012 till ny ordförande för Esperanto-Gården Ekonomisk förening. Sedan 1996 verkar Esperanto-Gården som kursgård och vandrarhem i Lesjöfors, Värmland.

Den traditionella sommarkursen i esperanto med grupper på tre nivåer och för barn arrangeras 14-21 juli.

Informoj/Information:

esperantosverige.se, Anna 050 379 3146

Esperanton maailmanliiton jäsenmaksut 2013

MG 10,00 (opaskirja, Esperanto verkkolehtenä),

MJ 25,00 (vuosikirja, Esperanto verkkolehtenä),

MA 61,00 (vuosikirja, Esperanto).

Alle 30-vuotias MJ ja MA: myös TEJO:n jäsenyys ja Kontakto (s. 1.1.1983 jälkeen).

Ainajäsen:

DM 1 525,00 (ainajäsen, 25 x MA, vuosikirja ja Esperanto),

DMJ 625,00 (ainajäsen, 25 x MJ, vuosikirja),

DPat 15 250,00 (ainaistukijäsen, 250 x MA, vuosikirja ja Esperanto, Societo Zamenhof -jäsenyys).

Tukimaksuja:

Patrono de TEJO 75,00 (3 x MJ-jäsenmaksu, Kontakto ja TEJO:julkaisut),

Dumviva Patrono de TEJO 1 875,00 (25 x PT-tukimaksu, Kontakto ja TEJO:n julkaisut),

Societo Zamenhof 122,00 (vähintään 2 x MA-jäsenmaksu).

Lehtiä:

Esperanto (UEA) **38,00**

Kontakto (TEJO) **23,00**

La Espero (Svedio) **23,00**

Monato **50,00** (lento-postina **54,00**)

Monato elektronisena **30,00**

La Ondo de Esperanto **38,00** (lento-postina **43,00**)

La Ondo de Esperanto elektronisena (pdf) **12,00**.

Maksut tilille: FI66 8000 2005 9953 69

Tiedustelut ja ilmoitukset:

Päivi Saarinen (ĉefdelegito)

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo
puh. (09) 813 3217 tai 050 490 0154

s-posti: eafoficejo@esperanto.fi

Konkurso pri kurtfilmoj – 125 jarojn Esperanto

La Germana Esperanto-Asocio okazigas kurtfilmkonkurson pro la 125a jubileo de Esperanto kun premioj valore de pli ol 5000 EUR. Ĉiu povas partopreni, ĉu komencanto aŭ profesiulo. Plej gravas kreemo.

La prezento de la venkintaj filmoj kaj la transdono de premioj okazos la 9an de februaro 2013 en Berlino dum la samtempa filmfestivalo. Kondiĉoj

- Ĉiu filmo rajtas longi maksimume kvin minutojn.
- La rajton uzi la muzikon por ajna publika montrado necesas havi kaj transdoni.
- La montritaj personoj devas konsentinti pri sia publika montrado en filmo.
- La filmkreinto garantias per sia subskribo havi ĉiujn necesajn permesojn kaj ne malobei rajtojn de aliuloj.
- Post la konkurso, ĉiuj filmoj estos publikigitaj je la permesilo Creative Commons (CC-BY) por ĉiuj.
- Eblas partopreni nur per filmoj, kiuj estis kreitaj en la jaro 2012.

Kio gravas?

Montru al ni, kio estas Esperanto por vi aŭ kiel eblas entuziasmigi homojn pri Esperanto. Ne gravas la lingvo, kiun vi uzas aŭ viaj teknikoj. Limoj interpreti forestas.

- Ĉiu povas partopreni: Hobiaj reĝisoroj, filmemuloj, media agentejoj, studentoj kaj kreemuloj el la tuta mondo.

- Ĉio eblas: de animacia filmo ĝis dokumentada filmo aŭ ĉefa filmo ĉio bonvenas. Ne ekzistas limigoj de formato. Eblas filmi per poŝtelefono aŭ profesia kamerao
- Eblas uzi ĉiun lingvon de la mondo.

Kiel partopreni?

- **Limdato estas la 31a de decembro 2012**
- **Necesas prezenti video-lumdiskon en kutima formato** (ekz. mov, mpg, avi, DVD)
- Bonvolu ne sendi originalan materialon, ĉar ni ne resendos ĝin.

Partopreno eblas nur per poŝtaĵo al:

Kurzfilmwettbewerb –
Deutscher Esperanto Bund
Silberburgstraße 82
D-70176 Stuttgart, Germanio


Premioj

Plej bona filmo	2000 EUR
Plej bona ideo	1000 EUR
Plej bona filmo en Esperanto	1000 EUR
Premio de la publiko	1000 EUR

Ne eblas jure procedi pri la konkurso. Se ne alvenas sufiĉe da filmoj, GEA rezervas al si la rajton ne disdoni ĉiujn premiojn.

Ĉu pliajn demandojn?

Vidu la retejon de GEA aŭ skribu retroŝton al kurzfilmwettbewerb@esperanto.de aŭ telefonu al *Rainer Kurz* +49-163-3873785.



La plej Tampere-a kulinara produkto estas la nigra kolbaso, kaj la firmao Tapola jam de sesdek jaroj ĝin produktas. En la kvindekaj, kiam ekzotikaj eksterlandanoj ne oftis eĉ en grandaj urboj,

oni vicstaris ĉe kiosko de Tapola en placo Tammela. Inter la klientoj estis ankaŭ tute nigra viro, apenaŭ iam renkontita en Tampere. Kiam venis la vico de la eksterlandano, la vendistino tute ne montris surprizon, sed demandis:

"Direktoro Tapola, kion al vi mem?"

Terpoma salato



Terpoma salato estas preparata el boligitaj terpomoj kaj pliaj aldonajoj. Principe oni povas distingi preparadon kun vinagro aŭ kun majonezo. Alternative eblas ankaŭ prepari la terpoman salaton kun jogurto, precipe por dietaj manĝaĵoj. Oni uzas tiel nomatajn salato-terpomojn kiuj post boligado restas solidaj.

La boligitaj terpomoj estas tranĉataj al disketoj kaj miksataj kun la kromaj aldonajoj. Eblas uzi t. n. sal-terpomojn kiuj estas boligataj sen ŝelo kaj ankaŭ terpomojn kun ŝelo. Precipe por la nordgermana variaĵo de la terpoma salato kun majonezo la terpomoj estas prilaborataj nur unu tagon post la boligo, ĉar tiam ili ricevas kroman solidcon. Por la sudgermana kaj aŭstra variaĵo de la salato la terpomoj estas prilaborataj kiam ili estas ankoraŭ varmaj. Alia formo de preparado konsistas el tio ke ili estas iomete dispremataj kaj tiel disfalas al pecetoj.

En suda Germanio kaj Aŭstrio ĝis Kroatio la tranĉitaj terpomoj prefere estas miksataj kun saŭco el buljono, vinagro, oleo, pipro kaj mustardo. Krome la salato povas enhavi dishakitajn cepojn, rostitajn lardokubetojn kaj kukumopecetojn. Ofte tiu salatsaŭco estas verŝata super la ankoraŭ varmajn terpomojn. La tiel preparita salato povas esti manĝata varma aŭ malvarma. En la sudorientaj regionoj de Aŭstrio (Stirio kaj Burgenlando) oni servas la salaton kun kukurbkerna oleo.

En la nordaj regionoj de Germanio la terpoma

salato estas preparata ĉefe kun majonezo. Ankaŭ miksaĵo kun jogurto kaj dolĉa lakta kremo eblas. Al la terpoma salato kun majonezo en la Rejnlando oni aldonas ofte spicitajn kukumetojn kaj pomojn. En la nordo regas variaĵoj kun pomoj aŭ boligita ovo. Aliflanke en Brandenburgio la spicitaj kukumetoj estas kombinitaj kun rafanetoj aŭ kun tranĉetoj de cepo. Eblas laŭplaĉe ankaŭ aldoni restaĵojn de rostita viando, pecojn de fiŝo aŭ de kolbaso kaj freŝajn herbojn al la salato.

Terpoma salato estas pro la vasta gamo de preparmanieroj tre ŝatata kaj multflanke aplikebla krommanĝaĵo por diversaj pladoj. Ofte ekzistas tradiciaj familiaj receptoj kiuj estas uzataj dum multaj jardekoj kaj transdonataj tra la generacioj. La terpoma salato estas ofte servata por kompletigi pladon kun kolbasetoj aŭ kotleto, sed ankaŭ por rostita fiŝo. Ĝi estas klasika kunmanĝaĵo por la Viena Eskalopo. Ĝi bone taŭgas por bufedoj kaj ĝi estas preparata dum festotagoj. En multaj familioj estas tradicio manĝi dum la kristnaska vespero terpoman salaton kun rostitaj aŭ boligitaj kolbasetoj.

Ankaŭ en mia familio terpoma salato estas alte ŝatata kiel kunmanĝaĵo por ekzemple frititaj panumitaj pecoj de kokina viando. Aldoniĝas tamen "verda salato" kaj aliaj salatoj.

Anton Oberndorfer
[Esperanta Retradio

(<http://peranto.posterous.com/>), 4.1.2012]



Turisto piede vagas laŭ vojo. Vesperiĝas, mallumiĝas. La turisto iras en biendomon apudvojan, petas lui ĉambron por tranokti. Juna mastrino hezitas: "Mi estas sola hejme, la edzo iris al urbo; mi ne certas..." - "Estu trankvila, sinjorino, mi estas ĝentlemano", diras la viro. - En la ĉambro li, laca, tuj enlitiĝas. Sed - jen malfermiĝas pordo, kaj la mastrino,

en negliĝo, eniras, ion kontrolas, ordigas, kaj restas stari ĉe fenestro. La gasto ne scias kiel konduki, decidas ŝajnigi dormanton por eviti ĝenan situacion. Fine la virino eliras al sia propra ĉambro.

Matene la gasto vidas en la korto malgrandan kokinaron kaj du kokojn, mirigite diras: "Strange, du kokoj harmonie inter la kokinoj." La mastrino diras la kialon: "Unu el ili estas ĝentlemano."

Esperanton kesäkurssi

Esperanton kesäkurssi 2013 pidetään Oriveden Opistossa 8.–12.7.2013. Opisto on ollut tunnettu kurssipaikka jo kauan, sekä talvella että kesällä. Sen Etäopistossa on mahdollista opiskella myös esperantoa. Opistossa on hyvin varustetut luokkahuoneet ja asutaan kahden hengen huoneissa, lisämaksusta yksinään. Oriveden kaupunki on hyvien liikenneyhteyksien varrella, 45 km Tampereelta ja 109 km Jyväskylästä.

Kurssi alkaa maanantaina 8.7. klo 11.30 lounaalla, jonka jälkeen klo 13 on kurssin avaus. Tämä kesätapaamisemme päättyy perjantaina 12.7. iltapäiväkahviin n. klo 14.30. Oppitunteja on yhteensä 25 ja opettajina ovat Sylvia Hämäläinen ryhmässä 1 (alkeiskurssi) ja Dalia Pileckienė Liettuasta ryhmässä 2 (jatkokurssi) ja muutaman tunnin ryhmässä 1. Ryhmä 3 muodostetaan, mikäli ilmoittautuu jo esperantoa käyttäviä opiskelijoita. Ryhmää johdattelee Jukka Laaksonen. Oppituntien ulkopuolinen aika käytetään muulla tavalla monipuolisesti esperantoa käyttäen.

Dalia Pileckienė on tutkinnon suorittanut esperanto-opettaja. Hän on opettanut useana kesänä Slovakiassa kursseilla, joihin osallistuvat mm. esperanton nettiopiskelijat. Sylvia Hämäläinen on Opettajien esperantoyhdistyksen puheenjohtaja ja opettanut kursseilla, mm. Valamossa, Sokeiden esperanto-yhdistys Steletossa ja Hämeenlinnan työväenopistossa.

Kurssimaksu

Kurssimaksu 390 € sisältää opetuksen, majoituksen ja ruokailut (aamiainen, lounas, kahvi, iltapala). Lisämaksu 1 h huoneesta on 80 €.

Ilmoittautuminen

Ilmoittautuminen 14.6.2013 mennessä. Suomea puhuvat ilmoittautuvat suoraan Oriveden Opistoon, muut Esperantoliiton sihteeri Tiina Oittiselle. Ilmoittautuessasi kerro myös mihin ryhmään ajattelet osallistua. Lisätietoja saa Sylvia Hämäläiseltä.

Yhteystiedot

Oriveden Opisto, <http://www.orivedenopisto.fi>, orivedenopisto@kvs.fi, Koulutie 5, 35300 Orivesi puh. 020 7511 511

Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, 050 549 4709 (ulkomailta +358 2 230 5319) Sylvia Hämäläinen, sylvia.h@kolumbus.fi, F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere, puh 050 321 4313 (ulkomailta +358 50 321 4313)

Somera Esperantokurso

La Somera Esperantokurso 2013 okazos en Orivesi-instituto 8.–12.7.2013. La Instituto estas jam longe konata kiel kursejo kaj somere kaj vintre. En ties Distanca Instituto oni povas studi ankaŭ Esperanton. La lernoĉambroj estas bone ekipitaj. Dormoĉambroj estas dultitaj, sed per kroma pago oni loĝas sola. La urbo Orivesi situas ĉe bonaj trafikvojoj, 45 km de Tampere kaj 109 km de Jyväskylä.

La kurso komenciĝos 8.7. je la 11h30 per lunĉo kaj malfermo je la 13a. La kursosemajno finiĝos vendrede 12.7. per posttagmeza kafe ĉ. la 14h30. Estos entute 25 lecionoj kaj instruos *Sylvia Hämäläinen* en la grupo 1 (komencanta) kaj *Dalia Pileckienė* el Litovio en la grupo 2 (daŭriganta). La grupo 3 estos por tiuj, kiuj jam uzas Esperanton. La grupon gvidas *Jukka Laaksonen*. Ankaŭ la kroman tempon ni uzos multflanke esperantolingve.

Dalia estas diplomita Cseh-instruisto kaj instruis multfoje en SES (Somera Esperanto-Studado) en Slovakio. Sylvia Hämäläinen estas prezidanto de Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj kaj ŝi instruis ekz. dum someraj kursoj de EAF en Popola Instituto de Valamo, en kursoj aranĝitaj de Steleto, Esperantosocieto de Blinduloj, kaj Laborista instituto de Hämeenlinna.

Kursokotizo

Kursokotizo estas 390 €, kiu inkludas instruadon, loĝadon kaj manĝojn (matemanĝo, lunĉo, kafo, verpermanĝeto). Krompago pri unupersona ĉambro estas 80 €.

Aliĝo

Aliĝo ĝis 14.6.2013. Finne (aŭ se vi scipovas la finnan lingvon) aliĝu rekte al Oriveden Opisto. El eksterlando kontaktiĝu kun *Tiina Oittinen*, la sekretario de EAF, ĉar la oficistoj de la instituto ne scipovas Esperanton. Aliĝante informu en kiu grupo vi intencas partopreni. Pliajn sciojn donas *Sylvia Hämäläinen*.

Kontaktoscioj

Oriveden Opisto, <http://www.orivedenopisto.fi>, orivedenopisto@kvs.fi, Koulutie 5, 35300 Orivesi tel. 020 7511 511

Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, 050 549 4709 (de eksterlando +358 2 230 5319)



Oriveden Opisto, Orivesi-instituto

Sylvia Hämäläinen, sylvia.h@kolumbus.fi, F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere, tel. 050 321 4313 (de eksterlando +358 50 321 4313)

Sylvia Hämäläinen

Lernolibro en brajlo



La Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) produktis brajlan eldonon de la lernolibro "Esperanto per rekta metodo"

de *Stano Marček*. Ĝi estis unuafoje kaj sukcese uzata dum la Somera Esperanto-Studado (SES-2010) en Slovakio.

La kvarvoluma brajla eldono de la lernolibro mendeblas je prezo de 5 EUR el Ĉeĥio rete de *Milena Jelinkova* ĉe: lunalumo@atlas.cz, pago al la konto de LIBE ĉe UEA: libk-p. Bv. informi la kasiston *Pier Luigi Da Costa* pri la pago (dacostapl@gmail.com).

Admono al aranĝantoj de kursoj: Bv. kon-

sideri, ke viddifektitoj povas studi Esperanton kune kun vidantaj gelemantoj. Modernaj sonregistraj kaj presteknikoj ebligas rapidan produktadon de lernomaterialoj en formo oportuna por viddifektitoj. Pri presado de brajlaĵoj bv. konsulti vian landan blindulorganizon.

La lernolibro "Esperanto per rekta metodo" haveblas en 27 lingvoj. Por hispanparolantoj ĝin brajligis *Pedro Zurita* (Hispanio). Steleto, la Esperanto-Asocio de viddifektitoj en Finnlando, brajligis la finnan eldonon de la lernolibro "Esperanto mutkattomasti".

Sukcesojn en la disvastigo de Esperanto!

Ritva Sabelli
Sekretario de Steleto



Muista lehdistä: Vierailu Memregada Domossa Ahvenanmaalla

Hufvudstadsbladet kirjoitti 16.9.2012 Suomen Esperantoliiton syyspäivistä Ahvenanmaalla. Päivien ohjelmaan kuului vierailu Ahvenanmaan päätöksenteon sydämessä, Itsehallintotalossa. Siellä kokoontuu maakuntapäivät, joka on saarten itsehallinnollinen kansanedustuslaitos.

Jutussa haastateltiin Ahvenanmaalle muut-
tanutta Anna Ritämäki-Sjöstrandia, joka toimi aikaisemmin Suomen Esperantoliiton puheen-
johtajana. Hän oli yhdessä nykyisen puheen-
johtajan Tuomo Grundströmin kanssa jutun
kuvassa. Esperantistit olivat nyt toista kertaa
Ahvenanmaalla, mutta edellisestä käynnistä on
kulunut aikaa. Se tapahtui vuonna 1985.

Anna toimi noin 40 esperantistin oppaana
sekä Itsehallintotalolla että Anni Blomqvistin,
Myrskyluodon Maija -kirjojen kirjoittajan, ko-
ttiin tehdyllä käynnillä Simskälässä. Annan mu-
kaan hän on tällä hetkellä Ahvenanmaan ainoa
esperantisti, mutta häntä on pyydetty järjestä-
mään kielen alkeiskurssi.

– Aloitin esperanton 1980-luvun alussa ehkä
enemmän älyllisenä leikkinä. Nyt kieli on kui-
tenkin osa minua, sanoo Anna.

– Esperantoa osaamalla hankkii kansainväli-
siä kontakteja toisella tavalla kuin opiskelemal-
la vain yksittäisiä ja erilaisia kieliä. Esperantos-
sa saavuttaa nopeasti sellaisen kielitaidon, että
kykenee keskustelemaan muiden kanssa koko
maailmassa.

Lisäksi Hufvudstadsbladet esitteli esperanton
käyttöä Suomessa, kielen helppoutta ja loogi-
suutta. Loogisuuden vuoksi puhuja voi itse ra-
kentaa sanoja käyttöönsä.

Jutun osana oli tietolaatikko, jossa mainittiin,
että tänä vuonna on kulunut 125 vuotta espe-
ranton synnystä. Lisäksi kerrottiin Zamenhofin
työstä kielen kehittäjänä ja hänen käsityksensä
sen tarpeellisuudesta ja hyödyistä muihin kie-
liin verrattuna.

Jukka Noponen

Flo Martorell ricevis la ĉi-jaran FAME-premion

En 1988 *Alois Meiners* starigis la fondaĵon
FAME por subteni la Esperantan kulturon, en-
kadre de kiu ĝi aljuĝas ĉiun duan jaron la “Kul-
tur-premion FAME” kun aldonita sumo de 3000
eŭroj – la plej alta premio-sumo en la Esperanta
mondo.

La ĉi-jaran premion ricevis *Floréal Mar-
torell*, por siaj meritoj rilate al Esperanta mu-
zika kulturo! La transdona ceremonio okazis
en la urbo Aalen (Aleno), en kadro de solena
festo kun subteno de la urba administracio. La
festprelegon faris konata germana esperantisto,
eksperto-muzikisto *Gunnar Fischer*.

Sincerajn gratulojn al *Floréal Martorell*, kaj
al la tuta teamo de la Esperanto-eldonejo Vinil-
kosmo pro la premio!

– retejo de Vinilkosmo:

[http://www.vinilkosmo-mp3.com/index.
php?language=e](http://www.vinilkosmo-mp3.com/index.php?language=e)

– retejo de la fondaĵo FAME:

[http://www.fame-stiftung.de/eo/kulturpremio.
html](http://www.fame-stiftung.de/eo/kulturpremio.html)

Szilvási László

[fonto: Ret-Info (eventoj.hu)]

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerroh / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) ☎ 050 329 8202 kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjarventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salo Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaäin ry. / Esperanto-societo Antaäin, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. www.esperanto.fi/tampere (Jukka Laaksonen: jvaletto@kolumbus.fi) ☎ 050 5829 248)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden

hintaa jäsenille on 16 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). esperarto@phnet.fi.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogruppo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2013

Nro	Limdato	Aperas
1/2013	28.1.	en februaro
2/2013	31.3.	en aprilo
3/2013	31.5.	en junio
4/2013	1.9.	en septembro
5/2013	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj


Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redakto:
eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Jubilea 90a Germana Esperanto-Kongreso 2013



Eble vi scias, ke la Nurenberga Esperanto-grupo estas la plej malnova de la mondo. Venontjare ni festos nian 125an jubileon kaj lige kun la festo la 90a Germana Esperanto-Kongreso okazos en nia urbo.

Ni planas malgrandan ekspozicion pri Esperanto ĝenerale kaj nia grupo speciale. Parto de tiu ekspozicio estu mondmapo ĉirkaŭata de gratulaj mesaĝoj el kiom eble plej multaj lokoj/landoj. La ideo estas ligi ĉiun mesaĝon per fadeno al la loko sur la mapo, de kie ĝi venas.

Por ke la tuto estu bunta kaj interesa por rigardi, estus bele havi ne nur simplajn skribajn gratulojn, sed krome ion specialan: desegnaĵon, foton, objekton tipan de la regiono, el kiu venas la mesaĝo... Ankaŭ plaĉus al mi, se la mesaĝo estus ne nur en Esperanto, sed dulingva, ĉar multaj homoj interesiĝas pri fremdaj lingvoj.

Mi tre ĝojus, se vi havigus al ni tian gratulon el Finnlando por ornamu nian mondmapon.

Cetere, se hazarde vi sopiras al Germanio: tute sube troviĝas ligilo al la kongresa retpaĝaro kun aliĝilo kaj tiel plu

Ĉion bonan,
Sabine Hauge

Moritzbergstr. 37, 90482 Nürnberg, Germanio

– 90a Germana Esperanto-Kongreso
Nürnberg (Nurenbergo) 17.–20.05.2013
Informoj kaj reta aliĝilo:
<http://www.esperanto.de/gek>

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy helmikuussa. Jutut 28.1.2013 mennessä toimitukseen. La venonta numero aperos en februaro. Artikoloj ĝis 28.1.2013 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltaasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: <eafgazeto@esperanto.fi>.

Kopio Niini, Tampere 2012